



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 1/2016 (206)

1. 4. 2016

Učebnice *Esperanto od A do Z*



Foto: Luděk Neužil

15. února 2016 byla v prostorách Jednoty tlumočnicků a překladatelů slavnostně představena nová učebnice *Esperanto od A do Z* od Petra Chrdleho a Stanislavy Chrdlové, která vyšla v nakladatelství KAVA-PECH. Spolu s ní byla uvedena další novinka nakladatelství, kniha *Robinsoni na Sibíři* od Tivadara Sorose. Jedním ze dvou kmotrů byl i předseda našeho klubu. >>> [více o knize na str. 5](#)

EL LA ENHAVO

Členská schůze 11. 2. 2016	2
Náš klub v pořadu Českého rozhlasu	3
Petr Chrdle 70-jaraĝa	5
O učebnici Esperanto od A do Z	5
Esperanto ĉe biero	7
Pri la verko de Jiří Patera (M. Turková).....	10
Kalvaria vojo – la 14 stacioj.....	14
Kvar sezonoj – Somero (J. Cíhová).....	18

Klub esperantistů v Praze

<http://bulteno.cs-retromusic.net>

Schůzky v ul. Ve Smečkách 25
ve vybrané čtvrtky od 17 do 19 h.

Bulteno

redaktor: Tomáš Břicháček

t.brichacek@seznam.cz

Koran dankon al Pavol Petřík kaj
Markus Beyer pro lingvaj korektoj.

Členská schůze 11. února 2016 (úryvek ze zápisu)

Dne 11. února 2016 od 17 hod. se konalo v klubovně v ulici Ve Smečkách 25, Praha 1 zasedání členské schůze Klubu esperantistů v Praze [...].

Účast

Dle stanov Českého esperantského svazu, z.s. platí, že členská schůze klubu (včetně klubu, který je pobočným spolkem) je schopna usnášet se při účasti alespoň 5 členů s hlasovacím právem. Tato podmínka byla splněna. Účastnilo se 11 členů s hlasovacím právem [...].

Volba zapisovatele a ověřovatele

Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila jako zapisovatelku Vlastu Pištíkovou a jako ověřovatele Víta Guiglielma Mišurce.

Zpráva předsedy

Předseda klubu Tomáš Břicháček přednesl zprávu o fungování klubu v období od posledních voleb výboru (27. 2. 2014).

Zpráva místopředsedy a pokladníka

Místopředseda a pokladník klubu Jiří Mišurec přednesl zprávu o členské základně a stavu financí.

Volba předsedy a dalších členů výboru

Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila nový výbor v následujícím složení

- Tomáš Břicháček
- Jiří Mišurec
- Vlasta Pištíková
- Vít Guiglielmo Mišurec
- Jan Šebetovský

Členská schůze jednomyslně (11 hlasy) zvolila ze členů výboru předsedu, Tomáše Břicháčka. Předseda je v souladu se stanovami Českého esperantského svazu, z. s. statutárním orgánem pobočného spolku.

[...]

Změna názvu

Členská schůze se jednomyslně (11 hlasy) usnesla, že název klubu / pobočného spolku nově zní **Klub esperantistů v Praze, pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.**

Cílem změny bylo vyhovět požadavkům nového občanského zákoníku.

Potvrzení změny sídla

Členská schůze se jednomyslně (11 hlasy) usnesla na prohlášení, jímž potvrzuje, že pobočný spolek sídlí na adrese **Jirečkova 5, 170 00 Praha 7** v bytě manželů Jiřího Mišurce a Vlasty Piščíkové.

Ke změně došlo na základě rozhodnutí výboru již v roce 2014. Členská schůze změnu dodatečně potvrzuje pro účely zápisu sídla do rejstříku spolků.

Klub esperantistů v Praze v pořadu Českého rozhlasu



11. prosince 2015 odvysílal Český rozhlas Radiožurnál krátkou reportáž o esperantu. Připravila ji redaktorka a moderátorka Eva Rajlichová (*na fotografii nalevo*), která navštívila 3. prosince náš klub a hovořila s našimi členy. V reportáži krátce vystupují Josef Trojan a Tomáš Břicháček.

Na stránkách rozhlasu je reportáž doprovázena následujícím textem:

Kolik lidí přesně mluví umělým jazykem esperanto, se neví, žádné oficiální statistiky neexistují. Můžou to ale být i

milióny. A i když se z něj nestal masově rozšířený jazyk, esperanto stále žije a je nejrozšířenějším umělým jazykem na světě. A lidé, kteří jím mluví, se scházejí i v Česku. Například v Praze.

„Mě vždycky zajímaly cizí jazyky a esperanto, které je umělým výtvozem, jenž staví na mnoha evropských jazycích,“ říká Tomáš Břicháček, tajemník pražského Klubu přátel esperanta.

Chápe, že pro mnoho lidí esperanto zní jako španělština. „Zní jako románské jazyky, ale slovní zásoba je především z němčiny, ale má třeba i slovanské prvky,“ popisuje.

Jak vypadá schůzka esperantistů? Navštívila ji Eva Rajlichová

Neuvěřitelných 65 let se věnuje esperantu Josef Trojan. Za socialismu byl právě tento jazyk jednou z mála možností, jak mít kontakt s cizinou.

„My jsme byli skauti, tak jsme se chtěli někam podívat, a tenkrát nám stačilo, že jsme si mohli dopisovat,“ popisuje. Díky esperantu získal přátele po celém světě. Dnes už podle Trojana mladí lidé k esperantu moc netíhnou. Přitom se dá podle členů pražského klubu naučit celkem rychle. Pokud už člověk některý cizí jazyk umí, je to údajně otázka pár měsíců.

Reportáž je dostupná na internetu na následující stránce:

http://www.rozhlas.cz/zpravy/clovek/_zprava/esperanto-znaji-lide-po-celem-svete-v-cesku-ma-jazyk-stovky-priznivcu--1563291.

Viktor Dvořák 80-jaraĝa



Koran gratulon al nia ofta gasto Viktor Dvořák el Moravské Budějovice, kiu la 25-an de marto festis sian grandan jubileon. Ni deziras al sinjoro Dvořák firman sanon kaj multe da energio.

Laŭ Vikipedio:

Viktor Dvořák estas ĉeĥa esperantisto en Moravské Budějovice, honora membro de ĈEA.

Li studis ĉe teknikumo en Jihlava (1951-1955) kaj ĉe la fakultato de teknika kaj nuklea fiziko en Prago (1955-1961), sekvis postdiploma studado ĉe la fakultato teknika kaj fizike-inĝeniera en Prago (1974) kaj scienca aspiranteco ĉe Universitato Komenský en Bratislava (1986). Poste li laboris ĉe esplorinstituto de nukleaj aparatoj en Přemýšlení-Zdiby.

Esperanto-agado

- Esperanton li komencis lerni en 1947 aŭ 1949, poste li paŭzis kaj revenis al la movado kiel emerito.
- Li prizorgis la esperantigon de la oficiala retejo de Moravské Budějovice (la tradukon mem realigis Zdeněk Hršel kaj enkomputiligis Miroslav Malovec)
- En 2008 en Ĉeĥio oni multe diskutis pri la bezono konstrui novan Nacian Bibliotekon por la ĉeĥa literaturo kaj diversaj organizoj sendis al Prago fondoŝtonojn. Viktor Dvořák prizorgis ŝtonon kun la surskribo *Esperantisté ČR* (esperantistoj de Ĉeĥa Respubliko), kiun proponis kaj gravuris Zdeněk Myslivec. La 13-an de majo 2008 V. Dvořák transdonis ĝin al la tiama ĝenerala direktoro de Nacia Biblioteko en Prago, magistro Vlastimil Ježek (reprezentita de la vicdirektoro). Samtempe ankaŭ donacan dokumenton, en kiu oni skribis: *La riĉaĵo enhavita en libroj prosperu al la popolo de tiu ĉi lando, por ke la ĉeĥa lingvo konserviĝu kaj la ideo de J. A. Komenio estu sciigita al la homaro, ĝi trovu sian aplikon kaj savu la lingvojn de nacioj antaŭ la morto.* La tekston de la donaca dokumento verkis Viktor Dvořák, esperantigis ĝin Jiří Patera kaj Jaroslav Krolupper. Pri la transdono raportis Ĉeĥa Televido sabate la 17-an de majo 2008, ĉar temis pri la 40-a fondoŝtono, kiun la planata biblioteko ricevis. La dua donac-dokumenton estas deponita en la Esperanto-muzeo en Svitavy kaj la tria en la Esperanto-muzeo en Vieno.
- Li preparis en la urbo jam du ekspoziciojn pri Komenio kaj la internacia lingvo.
 - La unua ekspozicio sub la titolo *Omaĝe al Komenio aŭ kiel ni komunikos en EU*, okazis en kastela ĉevalejo (8.-27.2.2009) sub patroneco de la Urba Kulturcentro.
 - Poste li estis petata ripeti la ekspozicion (1.5.-21.5.2009) en la urba Muzeo de Metioj omaĝe al la unua Esperanto-kurso en Moravské Budějovice antaŭ cent jaroj.
- En 2010 li preparis similan ekspozicion (de aprilo ĝis oktobro) en Jaroměřice nad Rokytnou, kie vivis la granda ĉeĥa poeto Otakar Březina (en ties muzeo sub la titolo *Ĉu Esperanto peros Otakar Březina al aliaj nacioj?*).
- En la biblioteko de Jaroměřice nad Rokytnou ripeto de la ekspozicio pri Komenio (6.-30. 4.2010)
- En 2010 li aranĝis ekspozicion (30.4.-23.5.2010) pri Sankta Klemento Maria Hofbauer-Dvořák en la Muzeo de Metioj en Moravské Budějovice. Parto de la ekspozicio (*Ĉu ne sufiĉus unu komuna lingvo?*) propagandis la ideon de internacia lingvo.

Petr Chrdle 70-jaraĝa




La 12-an de marto 2016 celebris sian grandan jubileon nia membro, la elstara mondkonata esperantisto **Petr Chrdle** – posedanto de la eldonejo kaj agentejo KAVA-PECH, longtempa aktivulo (ankaŭ iama prezidanto kaj vicprezidanto) de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kies estas ekde 2008 honora membro.

Ni deziras al Petr firman sanon, feliĉon kaj multe da sukcesaj eldonitaj libroj!

Ni volonte informas pri du novaĵoj de lia eldonejo – *Esperanto od A do Z* kaj *Robinsoni na Sibiri*:

Esperanto od A do Z



K nově vydané učebnici *Esperanto od A do Z* uvádíme průvodní text nakladatele a recenzi z pera Marka Blahuše.

Průvodní text nakladatele

Učebnice mezinárodního jazyka esperanto pro samouky i kurzy od úplných začátků do úrovně postačující nejen pro čtení běžných textů a běžnou konverzaci, ale i k sledování filmů a pod. Obsahuje 60 dvoustránkových lekcí, z nichž ve 40 se probere mluvnice a základní slovní zásoba, která je v dalších dvaceti konverzačních lekcích nadále tematicky rozvíjena. Publikace je doplněna o čítanku obsahující krátké ukázky různých žánrů (beletrii, poezii, odbornou literaturu i píseň, ale i další praktické informace o možnostech využívání esperanta. K učebnici jsou na webu k dispozici cvičení a mnohé další didaktické multimediální pomůcky (čtené texty, kvízy, písně, filmy). Veškeré doplňky na webu jsou bezplatné a bez nutnosti registrace. Viz <http://www.kava-pech.cz/procvicujesesperanto>.

Základ učebnice tvoří 3. vydání stejných autorů Esperantem za tři měsíce, které je však značně doplněno a přepracováno.

Ilustrace: Pavel Rak

Recenze od Marka Blahuše:


Kniha *Esperanto od A do Z* umožňuje samoukům osvojit si v relativně krátké době dovednosti potřebné k samostatnému používání nejrozšířenějšího mezinárodního plánového jazyka. Pomáhá jí v tom ostatně i samo esperanto, které bylo vytvořeno tak, aby se dalo naučit podstatně rychleji než jiné jazyky. Jeho znalost lze využít na cestách a při mezinárodních setkáních, v dopisování, k četbě nebo poslechu hudby, rádia či televize.

Základ učebnice tvoří 60 dvojstránkových lekcí, z nichž první čtyřicítka se zabývá gramatikou. Výklad teorie je však omezen jen na krátké poučky a jednotlivá pravidla jsou namísto toho osvětlována přímo na příkladech v esperantu s českým překladem. Velkým plusem učebnice je, že na konci každé lekce zvláště upozorňuje na ty jazykové jevy, které často dělají potíže právě českým studentům – v mnohojazyčných kurzech na internetu totiž obvykle takto konkrétní rady nenajdete. Každá pátá gramatická lekce je tzv. opakovací – čtenář v ní má za úkol přeložit souvislý text z češtiny do esperanta a porozumět předloženému esperantskému textu; svůj překlad si může porovnat s poskytnutým vzorem.

Závěrečných dvacet lekcí je určeno k rozšiřování slovní zásoby. Jde vlastně o malé frázové slovníky různých oborů, mezi nimiž nechybí ani vzdělávání nebo politika. Připojen je i přehled běžných zkratk a internacionalismů v esperantu. K procvičování naučeného lze využít čítanku, která současně výmluvně představuje u nás dostupnou esperantskou literaturu původní i překladovou. Zastoupena v ní je literatura faktu i beletrie, ba dokonce poezie. Oživením knihy jsou sympatické ilustrace Pavla Raka, který je sám esperantistou. Pro čtení textů lze použít esperantsko-český slovník, dostupný u stejného vydavatelství. Předností učebnice je i možnost využití kvalitně zpracovaných cvičení a nahrávek dostupných zdarma na internetu.

Učebnici doporučuji k vydání.

V Brně 23. 12. 2015



Robinsoni na Sibiři

Autobiografické napínavé vyprávění autora o útěku z ruského zajetí na Sibiři těsně po první světové válce. Doplněno faktologickými poznámkami editora díla, prof. Humphreyho Tonkina z Hartfordské university a mapou s vyznačením strastiplné cesty autora a jeho společníků.

Překlad: Jindřiška Drahotová

Ilustrace: Miroslava Tomečková.

Esperanto ĉe biero *Esperanto u piva*

La praga klubo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo restarigis la iaman sukcesan kurson *Esperanto ĉe biero*. La instruado okazas ekde la 8-a de oktobro 2015 ĉiun duan jaŭdon ekde la 19-a horo en diversaj pragaj restoracioj. La ĉefinstruisto estas Jan Šebetovský.

Aliĝis 12 lernantoj. 9 el ili frekventadas la kunvenojn. Kutime venas 3 aŭ 4 lernantoj. Kun ili partoprenas diversaj spertaj esperantistoj.

Esperanton ĉe biero origine fondis Tomáš Břicháček en la jaro 2004 kaj li estis la unua instruisto. Poste gvidis la kurson ankaŭ aliaj instruistoj kiel ekzemple Daniel Mrázek. La kurso funkciis proksimume kvin jarojn. Ĝi helpis kunigi junajn esperantistojn en Prago kaj fondi la pragan klubon de ĈEJ.

La plej grandan sukceson havis la kurso en Parizo, kiam Tomáš Břicháček instruis tie francajn interesantojn dum sia Erasmus-studado.

Aktualaj informoj troveblas en <http://mladez.esperanto.cz/kurz>. Pli da informoj ĉe jan@sebetovsky.cz.



Foto el unu de la lecionoj

„Esperanto u piva“ je kurz nejpoužívanějšího mezinárodního jazyka esperanto, v němž máte možnost se v neformálním prostředí naučit základy jazyka, který Vám otevře dveře do světa mezinárodních přátelství a umožní Vám poznat unikátní multikulturální prostředí.

Pasintaj aranĝoj

- 03/12/2015** - prezentado de Petr Chrdle pri la multimedia instrua kompaktdisko „Procviĉujte si esperanto“ (*kunvenejo de EKP*)
- 05/12/2015** – antaŭkristnaska kolbasumado en Saksio
- 11/12/2015** – nia klubo en radioprogramero de Český rozhlas Radiožurnál
- 15/12/2015** – Zamenhoftago en Prago
- 17/12/2015** – antaŭkristnaska kunveno en nia klubejo
- 19/12/2015** – Granda lokŝumado en Bratislavo
- 14/01/2015** – prelego de Margit Turková pri Jiří Patera – parto 1 (*kunvenejo de EKP*)
- 28/01/2015** – prelego de Margit Turková pri Jiří Patera – parto 2 (*kunvenejo de EKP*)
- 11/02/2016** – ĝenerala kunveno de nia klubo – elektita nova estraro kaj ŝanĝita la nomo (*kunvenejo de EKP*)
- 15/02/2016** – publika prezentado de la libroj *Esperanto od A do Z* kaj *Robinsoni na Sibiri* de KAVA-PECH
- 27/02/2016** – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental en la praga bestĝardeno kun festo de la „adoptotago“ kaj granda konkursa pikniko
- 11-13/03/2016** – 9a-BIERo (Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo) en Jihlava

Venontaj aranĝoj

Kunvenoj ekde aprilo

APRILo: la 7-an kaj la 21-an

MAJO: la 5-an kaj la 19-an

JUNIO: la 2-an kaj la 16-an

Kunvenoj komenciĝas je la 17-a horo

Programo de la kunvenoj estos prezentita en niaj interretaj paĝoj <http://bulteno.cs-retromusic.net/>.

En aprilo kaj majo okazos denove la agado Traduka printempo. Volontuloj povas traduki interesajn literaturajn tekstojn por la somera Bulteno. Informoj ĉe Tomáš Břicháček, t.brichacek@seznam.cz.

SELE 2016

SEMAJNFINA LERNADO
DE LA 21-A ĜIS LA 22-A DE MAJO 2016
CHOCERADY



VENU ĜUI AGRABLAN SEMAJNFINON EN CHOCERADY!
VENU TRAPASI NEFORGESEBLAJN MOMENTOJN KUN BONAJ
HOMOJ!

VENU IOM MANĜI, IOM TRINKI, IOM KANTI, IOM BABILI!
SED PRECIPE VENU LERNI ESPERANTON!!!
VENU PLIBONIGI VIAJN LINGVOSCIOJN!!!

ĈEFINSTRUTIUSTINO: MIRKA TOMEĈKOVÁ

PROGRAMO:

SABATO LA 21-AN DE MAJO 2016

ALVETURO

10:00 – 12:00 UNUA LERNOPARTO

12:30 TAGMANĜO

13:00 RIPOZADO

14:00 PROMENO

15:00 – 17.00 DUA LERNOPARTO

18:00 – VESPERMANĜO

AMUZA VESPERO

DIMANĈO LA 22-AN DE MAJO 2016

7:00 – MATENA GIMNASTIKO (POR VOLONTULOJ KAJ POR TIUJ, KIUJ
MALDILIGENTE LERNIS)

8:00 – MATENMANĜO

9:00 ADMIRADO DE ARBETOJ

10.00 – 12.00 TRIA LERNOPARTO

12.30 TAGMANĜO

FORVETURO

KION KUNPORTI: DORMOSAKON, KAJERON, SKRIBILON,
MANĜKONTRIBUAĴOJN POR TAGMANĜOJ, MATENMANĜO, VESPERMANĜO
KAJ NE FORGESU ANKAŬ TRINKAĴOJN!

<http://www.e-mental.cz>

Pri la verko de Jiří Patera

Margit Turková

En La Gazeto n-ro 181 estas kelkaj artikoloj dediĉitaj al nia, en la jaro 2015 forpasinta, klubo-estro Jiří Patera. Videblas la fotografaĵo, sur kiu JP transdonas 2 esperantigitajn librojn al inĝ. Richard Hašek, kiu estas nepo de la mondkonata verkisto Jaroslav Hašek (tio okazis en februaro 2011). Poste en la teksto legeblas: *Jiří Patera reprezentis Esperanton kun Margit Turková en hašekologia konferenco, je la 9.6.2011*. Do, la unua okazo kaŭzis la duan - simple dirite, ni estis invititaj partopreni la internacian konferencon omaĝe al la verkisto, kies (kun)organizanto estis ĝuste Richard Hašek - la nepo. Ni „virtuale“ transiru en la konferencejon kaj aŭskultu mian prelegon, kiun mi kuraĝis havi antaŭ la hašekologoj - fakuloj.

Estimataj amikoj,

ni (E) estas antaŭ tiel koncentriĝinta publiko „novuloj“ - kvankam Petro Chrdle prezentadas la nov-eldonitajn librojn kaj vortarojn el sia eldonejo KAVA-PECH, en Dobřichovice, ade okaze de la t.n. Hieronimaj tagoj (ĝuste en tiu ĉi ejo), do tial ni sentas nin kiel parto de via Instituto, al kiu ni dankas por la invito al la konferenco.

Antaŭ ol mi ekparolos je la temo „Hašek kaj la tradukado en Esperanton“, bonvolu rigardi la rezultojn de la menciita agado: 1) Jen la granda, oranĝkolora libro - *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk, 2004*

2) Kaj la alia libro - *Ne nur soldato Ŝvejk, 1994*, kiu estas volumo de 37 rakontoj, kiu estis eldonita omaĝe al la 110-a naskiĝdatreveno de Jaroslav Hašek. Ambaŭ estas el la eldonejo KAVA-PECH, ambaŭ enhavas la ilustraĵojn de Josef Lada.

En la revuo Esperanto, kiun eldonas la UEA, estis en la j. 2010 publikita listo de cent mondaj aŭtoroj, kies verkoj estas plej ofte tradukataj en Esperanton. Kaj estas ĝojige, ke inter tiuj aŭtoroj, kiel estas Homér, Shakespeare, Goethe aŭ Puŝkin estas listigitaj tri ĉeĥaj aŭtoroj: Karel Havlíček Borovský - *La bapto de sankta Vladimiro* (trad. Tomáš Pumpr), Karel Čapek - *Milito kontraŭ salamandroj* (trad. Josef Vondroušek), Jaroslav Hašek - *Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk* (trad. Vladimír Váňa).

Kaj jen ni estas ĉe nia punkto: la menciita libro estis en Esperanton tradukita trifoje:

unuafoje: ĝi estis eldonita en Parizo, 1934, tradukis Jaroslav Štádler (ĝi estis sen ilustraĵoj, enhavis 10 ĉapitrojn, 150-paĝa)

duafoje: la tradukon de la unuaj du volumoj faris Oldřich Kníchal, sed estis publikigita nur la 7-a ĉapitro – „Ŝvejk iras militon“, en la literatura gazeto *Fonto* (1983), de kiu ĝin prenis Wiliam Auld en la „Novan Esperantan Krestomation“, 1991; (ĝi troviĝas en la supre menciita volumo „Ne nur soldato Ŝvejk“).

La trian tradukon - ni ĵus al vi prezentis...

La rakontaĵoj de Hašek estis publikigitaj ankaŭ en ne tro gravaj esperantaj gazetoj - ekzemple en la praga BULTENO estis publikigitaj 15 rakontoj en traduko de Jiří Patera (1983 - 2000). Menciindas, ke la rakonto pri Ŝvejk el la Unua mondmilito „Brava soldato Ŝvejk lernas labori kun pafkoto“ eldoniĝis en la j. 1977 en traduko de la germana esperantisto W.Hoffmann, verŝajne tradukita el la germana.

Sed la rakontoj, kiuj konsistigas la publikaĵon „La politika kaj sociala historio de Partio de modera progreso en la limoj de leĝo“, ne vekis grandan ŝaton inter esperantistoj (escepte de unusola teksto el la menciita libro – „Protokolo de la II-a kongreso de la ...“). Sed en eksterlando estis intereso pri la „Partio...“ granda. La intereson pri ĝi esprimis ankaŭ la japana esperantisto **Kurisu Kei**.

Tiu ĉi interesiĝis pri la literaturo de diversaj nacioj kaj en la japanan li tradukis verkojn el Esperanto, el la angla, rusa, ĉeĥa. Li fariĝis faka bohemisto, ĉefe pro sia intereso rilate la ĉeĥan literaturon, kiu ankoraŭ pliprofundiĝis, kiam li estis de la Ministerio de edukado invitita instrui la japanan lingvon en la Karola Universitato (1959 - 1961). En la japanan li tradukis 13 verkojn - ekzemple „Němá barikáda“ de Jan Drda, de Fučík „Reportáž psaná na oprátce“, „Babička“ de Božena Němcová, kaj ankaŭ poeziaĵojn.

Sed nun temas precipe pri la tradukado de verkoj de Jaroslav Hašek, tial ni iru rekten al la kerno de ĝi. Plejtaŭge per la propraj vortoj de Kurisu Kei: *„Mia unua laboro post la reveno el Ĉeĥoslovakio en la j. 1961 estis la traduko de la enhavamaso romano Aventuroj de la brava soldato Ŝvejk de Jaroslav Hašek en la japanan lingvon. Kompreneble rekte el la ĉeĥa originalo. Ĝi estis eldonita en du volumoj, sed poste, kiam ĝi estis akceptita en la liston de l' fama eldonejo Iwanami, ĝi fariĝis kvarvoluma, ĉar mi en ĝin aldonis ne nur aliajn rakontojn kaj eseojn de Hašek mem, kiuj rilatis Ŝvejko-n, sed ankaŭ la artikolon de Josef Lada kiel mi ilustris Ŝvejkon. Sen tiuj unikaj, spritaj ilustraĵoj estas la verko neimagebla. La ĉeĥa eldono havas nur 150 ilustraĵojn, sed mi kompletigis ilin je pluaj 20 (el la libro Ilustraĵoj de Josef Lada), do entute da ili estas 176. Kaj samtempe mi poŝtute tradukis en la japanan La politika kaj sociala historio de Partio de modera progreso...“*

Do, jen estas la kadro de mia prelego, kaj samtempe certa faktokonstato de laborrezultoj de tiu ĉi japano - bohemisto - kaj esperantisto. Kiu pli bone, ol vi - mem tradukistoj, povas empatiiĝi en tian „turmenton de la spirito“, kiun travivadas ĉiu tradukanto. Kurisu Kei - kiel diligenta kaj pri lingvoj talentita (li komencis per la rusa), multfoje diras, ke se ne estus helpo de esperantistoj (laŭvorte „de eŭropa skalo“), li ne estus kapabla siajn tradukojn realigi. Plej bone ni en la problemon eniros, se ni interpretos la korespondadon (ĝian parton nur) inter Kurisu Kei mem kaj esperantistoj - ne nur la ĉeĥaj. El interreta korespondaĵo mi elektis la ekzemplojn de tiuj, kiuj havas ĉe la menciita kunlaboro la plej grandan meriton: Vlastimil Kočvara (Opava), Miroslav Malovec (Brno), Jiří Patera (Praha)...

Al Jiří Patera, (5.3.2003):

*„Ĵus mi ekkomencis traduki en la japanan la verkon de Jaroslav Hašek La politika... kun la helpo de Vlastimil Kočvara, ĉar tio estas por mi tre malfacila laboro - por ke mi liveru al la redaktoro ĉiusemajne du ĉapitrojn, tio postulas de mi multe da energio, ĉar tio estas nukso por mi ne facile solvebla... Ofte mi renkontiĝas kun demandoj, kiujn mi ne kapablas mem solvi: Koukala vřdycky nevinně jako svatá Alžběta (**Ŝi rigardis senkulpe kiel sankta Elizabeto**). Sed kion tio signifas, kia sanktulino ŝi estis??“*

(10.9.2004):

„Preskaŭ ĉiujn ĉapitrojn mi jam tradukis en la japanan, sed ankoraŭ restas la tasko de grunde revizii la tradukaĵon. Ĉu vi povus helpi al mi en tiu ĉi afero?“
(sendate):

*„Mi finis la tradukon de l' postparolo de **Radko Pytlík**** al la Historio..., kun la espero, ke vi mem ĝin tradukos en Esperanton - kaj poste mi mian japanan version laŭ ĝi pliperfektigos, ĉar tio estas tiel malfacile komprenebla, mi timas, ke mi faris grandan eraron...“*

**** La hašekologo Radek Pytlík ĉeestis la konferencon, do JP povis al li persone liveri la tradukon de Kurisu Kei, kaj tiel plenumi lian personan deziron.**

*„Zatímco jsem mu půjčoval, volal básník Neklan Soukenka: Přátelé, dnešní den znamená novou etapu v české literatuře. A znamenalo to také novou etapu pro číšníka, neboť to byla doba, než ta pěkná společnost stloukla na útratu. Moc špatnou kritiku pronesl tenkrát vrchní číšník: Vypili dohromady dvanáct piv a ještě šest z tácku umazali (**Dume mi al li prunt-liveris, kriis la poeto Neklan Soukenka: Amikoj, nia tago signifas novan etapon en la ĉeĥa literaturo. Kaj signifis tio ankaŭ la novan etapon por la kelnero, ĉar daŭris la tempo, ol la bela socio apenaŭ kolektis monsumon por pagi. Tre malfavoran kritikon tiam prononcis la ĉefkelnero: „Ili eltrinkis sume dekdu bierojn - kaj eĉ ses ili forviŝis de la bier-subtaseto“**)***.*

Nu, neniam mi, ke Kurisu Kei tion ne komprenis. Kvankam dum sia estado en Prago li renkontiĝadis kun esperantistoj - tiam eblis nur en tavernoj, apenaŭ li rigardis la ruzajn „ŝtamgastojn“, kiuj deŝmiradis la streketojn sur la subtasetoj. Se li devintus, li devintus - kiel ĝi estus por li utila; ĉar ankaŭ kun la „kroneto“ li havis problemon – kompreni, ke la menciita kroneto ne estas la kroneto, kiu koncernas la novedzinan nokton...

***** (Rim. MT: tiam oni la bieron metis sur porcelanajn subtasetojn, sur kiu bone per krajono skribiĝis - kaj „deskribiĝis“!! la streketoj pri eltrinkitaj bieroj. Ĉirkaŭe fariĝis „kroneto“. La rimarkon mi enigis por komprenigi la aferon al nesciantoj de ĉeĥaj cirkonstancoj, kaj ankaŭ por niaj junaj esperantistoj, kiuj same ne komprenas plu la historiaĵojn).**

„... té pohádce o ježibabě“ (la fabelo pri sorĉistino)... „Pri kia fabelo, pri kia sorĉistino temas?!“

„... terciárka Růže dominikánské“ (tercistino de la Rozo dominikana)...

„Oplátka“ – „kiam Hašek skribis tiun ĉi ĉapitron, la armeo apartenis al la Aŭstria Regno - do kian patrujon ĝi devis defendi - Ĉeĥion - Aŭstrion?...“

Vere, laŭ la korespondaĵoj, certe ŝvitis! la cerboj de niaj menciitaj ĉeĥaj esperantistoj, sed ankaŭ de hungaraj, de serbaj, de... al Kurisu Kei klarigi ĉiujn tiamajn situaciojn politikajn kaj geografiajn. Kaj estis multaj tiaj demandoj, se ne scipovis respondi unu - li rekomendis alia(j)n. Tia kunlaboro funkcias - kompreneme danke al elektronika komunikado, sufiĉe rapide.

Sed ni estas sur la ĉeĥa grundo, ni okupiĝas pri vortoj. Estas interese sekvi, kiel tiu ĉi japana bohemisto lertis koncerne la „artifikaĵojn“ de la ĉeĥa lingvo. Tiel diligente li lernis la lingvon, kaj nun ĝi „kornopuŝis“ lin.

(Rim. MT - sekvas nur la ĉeĥlingva teksto, ĉar estas tro specifa por traduko/kompreno en alia lingvo.)

„...řeknou hezky nahlas, že jsou to čápi, jinak nestojím ve slově“... „Proč jinak? Proč ve slově? , když v česko-anglickém slovníku nacházím v slově?“

„Noviny, které vydávaly židovské děti v Terezíně - proč se jmenují VEDEM a ne spisovné VEDEME?“

Estus ja malutile streĉi vian paciencon per pliaj ekzemploj. Ĉiuj onin provokas al la demando: „Ĉu mi kapablos klarigi?“ Bedaŭrinde ni ne scias, kiel Kurisu transformis ĉiujn artifikajn barojn al la japana. Verŝajne sukcese - se en Japanujo estas pri la verkaĵo de Hašek tia intereso. Ni ne povas pri tio debati kun la japana amiko, kiu mortis en la j. 2009 - 99-jaraĝa. Ĝis sia lasta vivetapo li laboris, li tradukis. Eĉ se li al la japana publiko prezentus nur la menciitajn verkojn, kiu povus dubi pri liaj meritoj? Sed - kiel jam menciite - li tradukis pliajn 13 ĉeĥajn literaturaĵojn - kaj tion li povis nur danke al la pera lingvo - Esperanto. Ne miru, karaj interpretistoj, ke ankaŭ ni estas pri niaj sukcesoj fieraj...

Kaj la rilato de Hašek al Esperanto? Li sciis, ke tio estas internacia lingvo kreita por utiligado al la homaro. (Pri tio en la rakonto „Psikiatria mistero“). Krom tio al la (reala, ne fikcia) sociala redaktoro, Karel Pelant, li dediĉis kelkajn liniojn en sia mistifikaĵo „La historio...“ En la j. 1901 estis en Brno fondita la unua Esperanto-klubo sur ĉeĥa teritorio, kaj tie kiel estro estis elektita ĵus menciita Karel Pelant. En la j. 1902 li eldonigis broŝureton „La ideo de l' internacia lingvo“, verŝajne la unuan ĉeĥan publikaĵon pri tiu temo, kaj la verkiston JH li pri tio certe informis. Eble tial havis JH al la lingvo rilaton iom „afablece-bonvoleman“, kiel ni povas prijuĝi el jena parto:

„Sinjoro Hurych do iris hejmen, trans la Karola ponto. Li iris kun la kontentiga konscio, ke li laboras por la bono de l' homaro. En sia stomako li ankoraŭ sentis malvarmeton de minerala akvo, sed iom pli supre - tie batis la varma, ardeca, filantropca koro, kiu preskaŭ grasiĝus, se la kuracisto ne estus malpermesinta al li trinki bieron. Do, li estis jam duono da jaro abstinentulo, verve li startis en la batalon kontraŭ la alkoholismo, fariĝis sekretario de la abstinenca asocio, abonis la gazeton Interesoj tuthomaraj, lernis ESPERANTON, kaj manĝis legomojn...“

Kalvaria vojo – la 14 stacioj *Via crucis*

Laŭ Vikipedio: La via crucis (latine), kalvaria vojo aŭ vojo de la kruco respektive kruca vojo estas kristana formo de preĝo. Ĝi estas medito pri la pasiono kaj krucumado de Jesuo Kristo, populara en la okcidentaj katolikaj eklezioj (la anglikana kaj la romkatolika).

Post la kristaniĝo de la Romia imperio, kristanoj faris pilgrimadojn al Jerusalemo, la urbo, kie Jesuo mortis. Post la krucmilitoj en la mezepoko, tia pilgrimado repopulariĝis. Pilgrimuloj vizitis Jerusalemon, kaj speciale la 14 lokojn (aŭ „staciojn“), kie okazis laŭtradicie eventoj de la pasiono.

Sed kiam malfaciliĝis por okcidenteŭropaj kristanoj iri al Jerusalemo, ili metis en siajn preĝejojn staciojn (bildojn de la 14 eventoj), kaj tiel la vojo de la kruco, kiel ni konas ĝin hodiaŭ, naskiĝis. Por fari la vojon de la kruco, oni (sole aŭ en grupo, speciale dum vendredo de la karesmo), iras de stacio al stacio, kaj meditas sur ĉiu el ili, unu post la alia. Neniuj „oficialaj“ meditoj ekzistas por tio, sed ekzistas multaj preĝoj, el kiuj la sacerdoto povas strukturi ĉiun vojon. La plej popularaj estas la preĝoj de Sankta Alfonso Maria de Liguori.

Pri la 14 stacioj de la Kalvaria vojo laŭ la paĝaro <http://via-crucis.net>:

Unua stacio : Jesuo estas mortkondamnita

Pilato do denove eliris, kaj diris al ili: «Jen mi elkondukas lin al vi, por ke vi sciu, ke mi trovas en li nenian kulpon.» Jesuo do eliris, portante la dornan kronon kaj la purpuran mantelon. Pilato diris al ili: «Jen la homo!» Kiam do la ĉefpastroj kaj oficistoj lin vidis, ili kriis: «Krucumu, krucumu lin... Ni havas leĝon, kaj laŭ tiu leĝo li devas morti tial, ke li pretendis esti Filo de Dio» ... Pilato elkondukis Jesuon, kaj sidiĝis sur sia tribunala seĝo. Pilato diris al la Judoj: «Jen via Reĝo!» La ĉefpastroj respondis: «Ni ne havas reĝon krom Cezaro.» Tiam do li transdonis lin al ili, por esti krucumita. (Joh 19, 4...16)

Dua stacio : Jesuo estas ŝarĝita per sia kruco

Ili prenis Jesuon, kiu, portante sian krucon, eliris el la urbo al la loko nomata Loko de Kranio, kiu estas en la Hebrea lingvo Golgota (Joh 19, 16-17)

«Vere, niajn malsanojn li portis sur si, kaj per niaj suferoj li sin ŝarĝis... vundita pro niaj pekoj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis.» (Jes 53, 4-5)

Kaj li diris al ĉiuj: «Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin, kaj levu sian krucon ĉiutage, kaj sekvu min. Ĉar kiu volos savi sian animon, tiu ĝin perdos; sed kiu perdos sian animon pro mi, tiu ĝin savos.» (Luk 9, 23-24)

Tria stacio : Jesuo falas je la unua fojo

Venis la horo, por ke la Filo de homo estu glorata. «Vere, vere, mi diras al vi: Se la tritika grenero ne falas en la teron kaj ne mortas, ĝi restas sola; sed se ĝi mortas, ĝi donas multe da frukto. Kiu amas sian vivon, tiu ĝin perdos; kaj kiu malamas sian vivon en ĉi tiu mondo, tiu ĝin konservos ĝis eterna vivo. Se iu min servas, tiu sekvu min; kaj kie mi estas, tie ankaŭ estos mia servanto; se iu min servas, tiun la Patro honoros. Nun maltrankviliĝas mia animo; kaj kion mi diru?

\ „Feliĉaj estas la senfruktaj, kaj la ventroj ne naskintaj, kaj la mamoj ne nutrintaj. Tiam oni komencos diri al la montoj: Falu sur nin; kaj al la montetoj: Kovru nin. Ĉar se oni tiel agas en la suka ligno, kiel oni agos en la seka?“ » (Luk 23, 27-31)

Naŭa stacio : Jesuo falas je la tria fojo

«\ „Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko pasu for de mi; tamen ne kiel mi volas, sed kiel Vi volas“ ... Li diris al Petro: \ „Ĉu vi do ne havis forton vigli kun mi eĉ unu horon? Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton; la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta.“ Denove la duan fojon foririnte, li preĝis, dirante: \ „Ho mia Patro, se ĉi tio ne povos forpasi, krom se mi trinkos ĝin, Via volo plenumiĝu.“ Kaj denove reveninte, li trovis ilin dormantaj... Kaj li denove lasis ilin kaj foriris, kaj la trian fojon preĝis, denove dirante la samajn vortojn. (Mat 26, 39-44)

Deka stacio : Jesuo estas senigita je siaj vestaĵoj

La soldatoj prenis liajn vestojn, kaj dividis ilin en kvar partojn, po unu parto por ĉiu soldato; kaj la tunikon; sed la tuniko estis senkudra, desupre teksita tra la tuto. Ili do diris unu al alia: \ „Ni ne disŝiru ĝin, sed lotu pri ĝi, kies ĝi estos“; por ke plenumiĝu la Skribo, kiu diras: Ili dividis miajn vestojn inter si, Pri mia tuniko ili lotis. Tion la soldatoj faris. (Joh 10, 23-34)

«Mi demetas mian vivon, por ke mi ĝin reprenu. Neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole. Mi havas la rajton ĝin demeti, kaj mi havas la rajton ĝin repreni.» (Joh 10, 17-18)

Dekunua stacio : Jesuo estas alnajlita al la kruco

«Ili kondukis lin al la loko Golgota... Kaj ili donis al li vinon kun mirho enmiksita, sed li ne akceptis ĝin. Kaj ili krucumis lin... Kaj estis la tria horo... Kaj la surskribo de lia akuzo estis surskribita: \ „La Reĝo de la Judoj“ . Kaj kun li ili krucumis du rabistojn, unu dekstre kaj unu maldekstre de li. (Mar 15, 22-27)

Diris Jesuo: \ „Patro, pardonu ilin; ĉar ili ne scias, kion ili faras.“ ... Kaj unu el la pendigitaj krimuloj insultis lin, dirante: \ „Ĉu vi ne estas la Kristo? savu vin kaj nin.“ Sed la alia responde admonis lin, dirante: \ „Por ni ja juste, ĉar ni ricevas rekompencan, merititan pro niaj faroj; sed ĉi tiu faris nenion malbonan.“ Kaj li diris: \ „Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon.“ Kaj li diris al li: \ „Vere mi diras al vi: Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo.“ (Luk 23, 34.39-43)

Dekdua stacio : Jesuo mortas sur la kruco

«Apud la kruco de Jesuo staris lia patrino, kaj la fratino de lia patrino, Maria, la edzino de Klopas, kaj Maria Magdalena. Jesuo, rigardante sian patrinon, kaj la apudstarantan disĉiplon, kiun li amis, diris al sia patrino: \ „Virino, jen via filo!“ Tiam li diris al la disĉiplo: \ „Jen via patrino!“ Kaj de post tiu horo la disĉiplo akceptis ŝin en sian domon.

Jesuo, sciante, ke ĉio jam finiĝis, por ke plenumiĝu la Skribo, diris: \ „Mi soifas\“... oni do metis spongon, plenigitan per la vinagro, sur hisopon, kaj levis ĝin al lia buŝo. Kiam do Jesuo ricevis la vinagron, li diris: \ „Estas finite\“ kaj, klininte sian kapon, li ellasis for la spiriton.» (Joh 19, 25-30)

«Jesuo, kriinte per laŭta voĉo, ellasis for la spiriton. Kaj jen la kurteno de la sanktejo disŝiriĝis en du pecojn de supre ĝis malsupre» (Mat 27, 50-51)



Dektria stacio : Jesuo estas deprenita de la kruco

«Por ke la korpoj ne restadu sur la krucoj dum la sabato... la Judoj petis Pilaton, ke oni rompu iliajn krurojn, kaj forportu ilin. Tiam la soldatoj venis, kaj rompis la krurojn... sed kiam ili venis al Jesuo, kaj vidis, ke li jam mortis, ili ne rompis liajn krurojn; tamen unu el la soldatoj per lanco pikis lian flankon, kaj tuj elvenis sango kaj akvo... Jozef el Arimateo, kiu estis disĉiplo de Jesuo... petis Pilaton, ke li povu forpreni la korpon de Jesuo; kaj Pilato permesis. Li do venis kaj forprenis lian korpon. (Joh 19, 31-34.38)

Dekkvara stacio : Jesuo estas entombigita

«Estis ĝardeno en la loko, kie li estis krucumita, kaj en la ĝardeno nova tombo, en kiu ankoraŭ neniu estis metita. Tien do... ĉar la tombo estis proksima, ili enmetis Jesuon. (Joh 19, 41-42)

«Jozef el Arimateo, envolvis la korpon de Jesuo en tolaĵo, kaj metis lin en tombo, elhakita el ŝtono, kie neniu antaŭe kuŝis. Kaj estis la tago de la Preparado, kaj la sabato eklumis. Kaj la virinoj, kiuj venis kun li el Galileo, sekvis, kaj vidis la tombon, kaj kiamaniere la korpo estis metita. Kaj ili reiris, kaj preparis aromaĵojn kaj ŝmiraĵojn. Kaj sabate ili ripozis laŭ la ordono.» (Luk 23, 53-56)

El la paĝaro <http://via-crucis.net/>

Kvar sezonoj – Somero

Jana Cíhová-Hrdličková

LIDICE

ROZOJ SUB LA MARTIRKRUCO

Ni venis tien ĉi jam foje
kiam arboj estis senfoliaj,
kiam akra vento vangojn pinĉis,
kiam nuboj kuris surĉiele.

Nian kuron la angor' ekregis!
Florbukedojn metis ni al monument'
de l' mortpafitaj,
kiuj devis iri for...
- ni demandas - KIAL?

Ni denove tien ĉi, la saman lokon venas,
kiam arboj je verdec' abundas,
kiam blovas varma suda vent',
kiam la sunbril' la teron senkompate vipas.

Kaj denove nian koron la angor' ekregas!
Florbukedojn metas ni al monument'
de l' mortpafitaj,
kiuj devis iri for...
- ni demandas - KIAL?

Hodiaŭ rozoj el la tuta mond'
ornamas lokon,
kie vivon piedpremis
beste kruda bot'.

Rozaromo venkas la angoron
kaj ni ĉiuj kredas la esperon:
certe iam tuta mondo estos
de la rozoj bed',
sen dornaro,
ĉar la dornoj restis ja por ĉiam
k r o n p l e k t i t a j
sur la martirkruco
EN L I D I C E
por AVERTO!

ĈIAM LIDICE

Nur dezerto restas sur la loko,
kie iam svarmis vigla vivo.
Kie homoj ĝojis pri la viv'.
Morto venis -
- prenis la imposton,
 kiu al Ĝi eĉ ne apartenis.

Kampo de la rozoj.
Dum promeno
mia mano
tuŝkaresas roz-burĝonon.
 - Ĝi similas al infan'!

La okulo
ravigardas rozo-kronon.
 - Ĝi similas al virin'!
Robo-jupo
kaptas sin je roz-dorneto,
 kiu kvazaŭ ŝirmi emus
 la belaĵon
 ekflorintan

el la grundo
ŝprucigita per la sango
 de mortintoj,
 martiritoj,
 ja! - sanktuloj,
kiujn ne sanktigis l' Eklezio
sed la raba murdigilo,
la fusilo,
 estinginta raran vivon,
 postlasinta la vidvinon
 kaj infanon.

Rozoj kaj burĝonoj...
La virinoj kaj infanoj...
En Lidice restis solaj - la virinoj -
sed ni ĉiuj
en la monda
restu
familia rondo
 kunlabore por la paco
 sur la tera glob-surfaco.

ĉiam staru kune - ni virinoj,
gardu la infanojn - ni patrinoj!
Ne plu ripetiĝu la horor'
 en Lidice,
 de furor' - la hor'!

LA INFANO EL LIDICE

Viro nun -- li tiam estis
 knabo nur sepjara
kiam ili venis,
 la murdistoj,
 mortpafinte lian patron;
la patrinon
sendis en la koncentrejon...
... lin savis
blondaj haroj
 kaj okuloj klare bluaj.

Dum ke la virinoj al Lidice
mortis same kiel
 la aliaj multaj infanetoj
Li pro la okuloj klare bluaj
kaj la haroj blondaj
transportita vivis ie - familie
en medio tute fremda
 fororgesante lingvon ĉeĥan
 ekkonante patron novan
 forviŝante el la koro
 kaj al sia rememoro
 ion, kio estis lia.

Savis Lin haroj blondaj
kaj okuloj klare bluaj
jen la signo tutsenduba
de la raso sankta, pura!
Savis Lin la haroj blondaj
kaj okuloj klare bluaj ...
Dudek jarojn vent' forblovis
kaj revenis vir' matura,
ĉar post jaroj dudek trovis
Lin oficoj

laŭ matricoj.

Kaj jen staras knabo iam -
nun jam viro plenmatura
sub piedoj „in natura“
kio l' hejmo estis iam.

Herbo scivoleme al ĉiel' leviĝas
akuzante montrofingre
la kruelon permesitan...

Dekstre staras novaj hejmoj
kun ĝardenoj, florobedoj,
kie nia Knab' - la viro
tuŝas florojn kun admiro,
retrovinte la patrinon
plukas rozon ĝin metante
kun la am' en ŝian sinon.

Tiam savis Lin la blondaj haroj
kaj okuloj klare bluaj...
Jen la signo tutsenduba
de la raso sankta, pura!
Tiam savis Lin la haroj blondaj
kaj okuloj klare bluaj...

Kiom da aferoj ŝanĝis sin de tiu temp'!
Kaj la urbo, kaj la homoj,
kaj okuloj, kaj la haroj!

Tiam savis Lin la haroj blondaj,
sed hodiaŭ ili estas blankaj,
kaj okuloj klare bluaj
jam fariĝis grize puraj
spertaj dum la dudek jaroj,
sed kun ĝojaj elrigardoj
en estontan...

Kaj Li vivas, spiras, ĝojas
konsciante
ke nur tre malmultaj kiel Li
sin savis
pro l' okuloj klare bluaj
kaj la haroj blondaj,

blondaj...

Vivas plu - Lidice, la urb':
flirtas haroj en la vent'.
brilas klare la okuloj...
FORE ESTAS NIGRA LA PASINT'.

NATURBILDO

Sidas mi ĉe rand-arbar'.
Sidas mi sub arb' vundita.
Belaromas la rezin'.

Bela tago!... kaj sunbril'.
Sur herbejo la virinoj
turnas fojnon al la sun'.

La laboron ĉe river'
lerte faras la maŝino,
kiun tiras la ĉeval'.

Ĵetas, ĵetas la maŝin'
sekan fojnon tutsimile
kiel fosas hund' kaj vulp'.

Dekstre ie sub ĉiel'
ŝvebas birdoj, flugmaŝino.
Jen koncertas daŭre gril'.

Kun paletro en la man'
akiris mi impres-abundon.
Sunsubir' avertas min.

Poreterne ĝojos mi
hejme pro la bela bildo
nun en kadro sur la mur'.

FINE DE L' SOMERO

Fulmo pajlofaskon ekbruligis
balancantan en la vent'.

Timas mi

ke l' incendi' bruligos çion
kio ĝian sferon falas.

Brulas frunto
maltrankvilas kor'.
La manplatoj brule palpas
realecon en la songê'.

Pro vi la fantazio plejabundas.
Je vi odoras mia rob'.
çeestas vi en mia taglabor'
kaj eç en mia endormiĝ'.

Fine de l' somero
la centifoli' bruliĝis ruĝe,
pikas per dornaro
sindefende
antaŭsente
ŝirrompiĝi de l' arbust'.





B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Odesílatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7